N. N. 32,

# Elkreskis rozbranĉeto

*tradukita de Joachim Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto
el rozarbust' de Di'.
Aŭguro de profeto
rakontis jam pri ĝi.
Naskiĝis rozfloret'
meze en vintra nokto
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -
Jesaj' prognozis ĝin -
el sia korpo sproson
Mari' la virgulin'.
Laŭ dipotenca vol'
ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto
tre hele lumas ĝi.
Obskuron la brileto
forprenas nun de ni.
Vi hom' kaj vera Di'
el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html` *. sub* `http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf` *.*